
# starto

ELDONAS ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



1981 ·6· (88)

KOVOVÉ

METALAJ REMIZOJ

GARÁŽE

el ŝtala lado - fundamenta farbotavolo - duparta pordego - deklina tegmento - sen planko - facila muntado aŭ sur submuro aŭ sur ebena tereno

Longo 4400 mm - prezo 4840,-Kčs
Longo 5300 mm - prezo 5350,-Kčs
Longo 6200 mm - prezo 5830,-Kčs
Larĝo 3030 mm alto 2450 mm estas egalaj ĉe ĉiuj tri tipoj.

Je mendo fabrikas kaj dum malonga tempo 1-2 semajnoj liveras

INKLEMO

PRAHA (kooperativo)

Skribajn mendojn sendu al la adreso de komerca fako: INKLEMO PRAHA, maloobchodní úsek, 190 00 PRAHA 9, Spojovací 11, aŭ telefonu al n-ro 83 09 49. Persone mendeblaj en Pragaj vendejoj de la kooperativo. Transporton ni povas certigi. Remizojn ni liveras nur al privatuloj.


# Na prahu roku 1982

Každý rok se opakuje stejný zvyk koncem starého či začátkem nového roku, že si lidé přejí v dobré vůli hodně zdraví, úspěchů štěstí či spokojenosti do budoucího období. Když budeme řadit za sebou podle hodnony, ceny či významu tyto podmínky života, stále více do popředí a v poslední době na prvé místo se dostává to nejdůležitější, důležitější než zdraví a štěstí...přání žít v míru. Je bezpochyby, že bez míru nebude ani těch dalších hodnot. I esperantisté se přidávají v jednotě s dalšími silami v naší společnosti, v jedné frontě s poctivými lidmi celého světa do rozhodného boje za zachování míru. Činí tak svými možnostmi mít kontakt s lidmi jiných národů a zemí. Je vidět, že na celém světě a tedy i mezi esperantisty se zcela přirozeně polarizuje společenský a politický vývoj ve světě.
Nelze tedy říci, a bylo by to od nás velice naivní, že lze v esperantském hnutí, práci a postojích zachovávat neutralistický přístup. I když počátky našeho hnutí byly do určité míry poplatné tehdejšímu společenskému vývoji a sám autor esperanta vložil do hnutí určitý impuls neutralismu, nemůže se esperantista stranit palčivým otázkám dneška, které jsou bezesporu politického rázu. Já vám přeji, abyste vždy věděli kde je vaše místo, abyste se vždy správně orientovali a zaujali rozhodná stanoviska ve prospěch pravdy, lidského štěstí a zachování trvalého míru pro všechny lidi.

Křimský Zdenko
tajemník svazu

## KONSTRUI LA PACON

La celo kaj "fina senco" de la Internacia lingvo estas la paco kaj amikeco inter la homoj kaj popoloj. Tio estas la gvidlinio ne nur de la porpaca sekcio, sed ankaŭ la kriterio por agado de ĉiuj niaj sekcioj, komisionoj kaj lokaj grupoj. Nia devo estas helpi, konstrui kaj krei kondiĉojn por pli efika paca kunlaboro.

Antaŭ nelonge mi legis, ke en Hungario okaze de solenaĵoj de kelkcentjara ekzisto de iu urbo, estis invititaj pluraj ĝemelurbaj delegacioj. La interkomprenigado de la alvenintoj estis tre malfacila. Sed la esperantistoj jam longe antaŭvidis tiun ĉi situacion kaj enkontaktiĝis kun esperantistoj en la koncernaj ĝemeliĝaj urboj. Kiam venis la menciita evento - la solena datreveno - en ĉiuj delegacioj venis ankaŭ po unu esperantisto kaj la interkomprenigo estis solvita kaj la lingvaj baroj estis venkitaj. Tia efika helpo tre impresis la ĉeestantojn kaj pruvis utilecon de la Internacia lingvo.


En nia ĉirkaŭaĵo ni vidas, ke kreskas amikaj kontaktoj inter entreprenoj kaj agrokulturaj koperativoj en diversaj landoj. La

amikaj rilatoj prezentiĝas per faka kunlaboro, reciprokaj vizitoj, interŝanĝado de spertoj kaj uzado de ripozigaj aranĝaĵoj. En kelkaj - ĝis nun esceptaj - kazoj enmiksiĝas ankaŭ esperantistoj kaj helpas venki la lingvajn malfacilaĵojn. Ili efike montras la utilecon de Esperanto por kontaktoj kaj de simplaj homoj, kaj de fakuloj.
Ni ĉiuj pripensu, ĉu via urbo aŭ distrikto aŭ iu entrepreno havas ĝemel-partneron en eksterlando, kontaktu la tieajn esperantistojn. Metu plian ŝtoneton en la mozaikon de la Paco.

-jl-


KUNVENO DE CENTRA KOMITATO DE Ĉ E A

okazis la 14an de novembro en Praha por fintrakti laborplanon kaj asocian buĝeton por la jaro 1982.
Estis akceptitaj proponoj por nia 4-a asocia kongreso, kiu estas planita por la 19.-21. 3. 1982. Invititaj estis gastoj el socialismaj landoj, sed ankaŭ el Finnlando, UEA kaj la reprezentanto de IFEF s-ro J. Giessner. La komitatanoj informiĝis ke ankaŭ REKREA intencas uzi nian asocian kongreson por inviti turistojn el pluraj landoj. Do nun estas vere jam dezirinde, ke niaj membroj, kiuj volas partopreni tiun aranĝon, tuj aliĝu al la asocio kaj ne atendu plu. La tranoktéblecoj estas limigitaj.
La kunvenon de CK de ČEA partoprenis ankaŭ estroj de asociaj komisionoj kaj sekcioj.




Reprezentantoj de nia asocio aktive partoprenis seminarion de UEA pri planado, kiun aranĝis Asocio de esperantistoj en Kulturligo en Bad Saarow ĉe Berlino. La celo estis pretigi materialon por kadra laborplano de UEA / La 4a Laborplano/.
Dum 5 tagoj /de 16.11-21.11.'81/ pli ol 30 elektitaj personoj el nesocialismaj kaj socialismaj landoj laboris komune kun la estraro de UEA. Niaj reprezentantoj tie informis





pri finita sociologia esploro de sintenoj al Esperanto. Tiu laboro kaj rezultoj vekis grandan intereson. Oni ĝin pliprofunde studos kiel unu el metodoj por planado.
Kun la rezultoj de tiu seminario/kiun ĉiu kaze povas jam nun pozitive taksi / vi baldaŭ konatiĝos en gazeto de ESPERANTO aŭ en nia Starto.
Sur la foto vi vidas d-ron Borman kaj d-ron Corsetti prezenti skemon en kiuj direktoj oni devas plani agadon de E-o movado. / foto Z. Křimský/.

KONFERENCO de porpaca sekcio /MEM/ estis aranĝita en granda salono de Rieger-parko en Praha la 15an de novembro. Estis pridiskutita estinta laboro de la sekcio, ĝiaj atingaĵoj kaj mankoj. La asocia sekretario Z. Křimský substrekis, ke la sekcio devas esti pli iniciativa kaj gvidi homojn, instigi ilin al novaj agoj por defendo de paco, prepari konvenajn aranĝojn. Ofte okazas, ke tion faras mem la sekretario, kio ja ne spegulas bonan situacion. La sekcio devas esti unu el plej agemaj, iniciatema, gvidema kun forta kontraŭmilita starpunkto. Ankaŭ la aktiveco en la redaktado kaj eldonado de la revuo PACO devas esti multe pli vigla kaj celhava. La laboro fortigu la enlandajn fortojn, sed ankaŭ estiĝu fortiga kunlaboro kun samcelaj fortoj en okcidentaj landoj. Certigo de tuttera paco kaj de paca vivo nepre bezonas la fortojn de ni ĉiuj!
Dum la konferenco estis elektita ankaŭ nova sekcia estraro. Estis akceptita rezolucio kontraŭ armado.
Sur la foto malfermo de konferenco pere de kutura programo. Poemon legas E. Seemanová. Konferencon partoprenis kiel gastoj reprezentanto AESSR d-ro Satura kaj reprezentanto de Ĉehoslovaka packonsilantaro d-ro Jaroslav Kvaček / foto Z.Křimský/.



## LA TAGO DE LA ESPERANTA LIBRO

Ĉiujare ni celebras la naskiĝtagon de D-ro Zamenhof - la 15an de decembro - kiel la Tagon de la Esperanta Libro. Ĝi estas la plej digna maniero de la festado de la persono kaj verko de la kreinto de Esperanto. La Tago de la Esperanta Libro estas tre konvena okazo por pli signife okupiĝi pri la Esperantaj libroj originalaj kaj tradukitaj, prozaj kaj poeziaj. La 15a de decembro ne estas la sola tago, kiam ni interesiĝas pri la Esperanta literaturo, ankaŭ en la ceteraj 364 tagoj de la jaro ni ĉiuj laŭ siaj ebloj legas, studas, aĉetas, pruntepreneas aŭ donacas Esperantajn librojn, diskutas pri ili kaj faras ĉion por kiel eble plej efike disvastigi nian Esperantan literaturon kaj tiamaniere nian karan lingvon mem.

Bedaŭrinde ne ĉion ni ankoraŭ faris por plene uzi la eblecojn, kiujn ni havas. Ekzemple nur malmultaj scias, ke estas prunteblaj Esperantaj libroj, precipe lernolibroj, ankaŭ en la Urba Biblioteko /en Placo de D-ro Vacek/, en la Ŝtata Biblioteko /Klementinum/ kaj en la Biblioteko de Jaroslav Šustr ĉe EK Praha /Asocia adreso/.

Estus dezirinde, ke la publikaj bibliotekoj havu je dispono ne nur lernolibrojn, sed ankaŭ beletrajn librojn kaj ankaŭ fakajn kaj sciencajn verkojn. Sed por atingi tion la esperantistoj devus montri sufiĉan interesiĝon pri la Esperantaj libroj. Dume ne estas tiel. Se mi rigardas la Esperantajn librojn en la Urba biblioteko, ili estas tre malofte pruntepreniataj de interesuloj. Ekz. la lernolibro de D-ro Gustav Ždárský - Karel Procházka /sign. R 2269a/ estis pruntita dum 47 jaroj entute 50-foje, t.e. meznombre unufoje jare.

Ni prave fieras, ke Esperanto estas viva lingvo kun la vivanta movado kaj floranta literaturo. Ne lasu la Esperantajn librojn senvive kuŝi kaj kovriĝi per polvo... Ni montru, ke kontraŭe ili estas vivantaj libroj plenumantaj la vivajn bezonojn kaj kontentigantaj la vivan interesiĝon de siaj legantoj. Eĉ se ili estas nur lernolibroj. Nur tiam ni povos pli bone influi la opinion de bibliotekaj laborantoj pri nia lingvo kaj ankaŭ atingi la plilarĝigon de la librostoko en la publikaj bibliotekoj. Ni pripensu tion almenaŭ dum la Tago de la Esperanta Libro.

J. Patera /eltiraĵo el la fruntartikolo-BULTENO de EKP Praha/

## 70 JAROJ DE EK OLOMOUC

Esperantista societo de Parko de kulturo kaj ripozo en Olomouc participas jam 70 jarojn en la kultura agado de la urbo. Gravaj estas la periodo de libroeldonejo Moraviaj Esperanto Pioniroj kaj la kunlaboro kun la najbaraj kluboj en Prostějov kaj Přerov. Dum la Solena vespero la 9an de okt.1981 parolis pri tio la vicprezidanto de la Rondeto D-ro Vl.Mohapl. Salutojn poste transdonis la estro de kultura sekcio de Distrikta nacia komitato k-do Hartman. Kara gasto el Volgograd s-ano A. Michajlov informis nin pri esperantista agado en regiono de Volgograd kaj Volžskij; en la nomo de ĈEA kaj de la Paca sekcio de ĈEA prezentis salutojn s-ano Drahomír Kočvara el Ostrava; ĉeestis gastoj el Prostějov, Přerov k.a.

Je la fino de riĉa kultura programo la ĉeestantoj aprobis la rezolucion protestantan kontraŭ la nuklea armado, kiu estis forsendita al Ĉeĥa packonsilantaro. Krom tio estis forsendita porpaca rezolucio al samtempe en Praha okazanta konferenco de Internacia federacio de virinoj.

Venontjare atendas la olomoucajn samideanojn dua grava okazintaĵo: la 50-jara jubileo de Esperanto-arbo kun Memorŝtono en parko de Smetana kaj de najbara strato de D-ro L.L. Zamenhof.

Vl.Blažek

---

LA MONDA KONGRESO DE VIRINOJ - fina teksto de la propona komisiono, aprobita la 13an de oktobro '81.

A l v o k o al la virinoj de la Mondo.

La danĝero de la hidrogena milito ŝvebas super la homaro kiel neniam antaŭe. Ĝi endanĝerigas ĉiun virinon, ĉiun viron, vian infanon - ĉiujn infanojn.

La vetarmado elvokita de registaroj ambiciaj por militsupereco, alproprigas al si fantaziajn profitojn el la negoco per la mortportantaj armiloj.

La dislokiĝo de novaj direktigotaj armiloj por pafdistancoj en Okcidenta Eŭropo, kaj fabrikado de neŭtronaj bomboj kondukos al pli novkvalita, pli danĝera vetarmado. Tempo urĝas. La vetarmado pli rapidas kaj minacas la danĝero veni en la sferon, de kie reveno ne ekzistas.

Estas urĝe kiel unuan rimedon malpermesi la neŭtronajn armilojn, haltigi amasigon de hidrogenaj armiloj en Eŭropo kaj komenci trakti serioze pri ilia malplialtigado. Fabrikado kaj vastigado de hidrogenaj armiloj en Proksima Oriento, en Afriko kaj aliaj mondkontinentoj ne darfu okazi; armil-bazoj, kie oni instalis la hidrogenajn armilojn devas esti likviditaj; uzo de ĉi tiuj aŭ aliaj amas-detruaj armiloj devos esti kondamnita kiel krimo kontraŭ la homaro. Ĉiuj ekzistantaj provizoj de la armiloj devas esti detruitaj, por tiel montri paŝon al la ĝenerala kaj kompleta senarmigo.

Ĉiun minuton oni elspezas unu milionon da dolaroj por armigo. Milionoj da homoj - virinoj kaj infanoj - suferas kaj mortadas pro malsato, laŭrekta kaŭzo de la disponigo de financfontoj de amasigo de armiloj. Tiu ĉi amasigo forprenas al homo ĉiutagan manĝaĵon, vestaĵojn, hospitalojn, lernejojn kaj labor-okazojn. Egaj milit-elspezoj senigas virinojn de necesaj kondiĉoj por aplikado de iliaj rajtoj.

Amasigon de l' armiloj oni devas haltigi


La danĝero de la hidrogena katastrofo intensigita pro ekspanziaj ambicioj de tiuj, kiuj fidas, ke tutaj teritorioj de la mondo povus servi por iliaj egoismaj celoj, tiel oni kreas kaj altigas la fokusojn de milita streĉeco.

La monda paco kaj sekureco estas endanĝerigitaj de tiuj, kiuj

klopodas malhelpi la landojn, kiuj sin liberigis kaj detronigis kolonian dependecon por povi vivi en paco. Oni entreprenas agresivajn agojn kontraŭ ĉi tiuj nacioj kaj kontraŭ homoj, kiuj luktas por sia nedeprenebla rajto pri memdispono, nacia sendependeco kaj socia progreso. Armad-teroron oni ekscitas eĉ kontraŭ la nacioj, al kiuj estis forprenita ilia patrolando. ĈI TIUJ AGOJ DEVOS FINIĜI!
Ĉiuj formoj de senrajteco, rasa kaj kolonia subpremado de nacioj, devos esti forigitaj de la tersupraĵo.

Estas eble kaj necese malhelpi militon
Pli grave ol kiam ajn antaŭe montriĝas, ke konfliktaj situacioj tutmondaj - devos esti solvataj politike, surbaze de traktado kaj neniam uze de militiloj!
Forta paca movado disvolviĝis tutmonde, kiel neniam antaŭe. Por ke niaj infanoj kaj la homaro ĝenerale transvivu, estas necese, ke ĉi tiu movado fariĝu ankoraŭ pli potenca kaj unueca, ke ĝi fariĝu nevenkebla forto. Virinoj apartenas kaj formas pli grandan parton de la civitanoj de tiu ĉi mondo. Ĉu niaj infanoj vivos en mondo de la paco aŭ ĉu la vivon de nia planedo oni ekstermos pere de hidrogena milito, dependas de ni - virinoj.
La tempo urĝas!
Alarmante ni alvokas la virinojn de la mondo: eluzu ĉiujn eblajn rimedojn, sendu leterojn, rezoluciojn el la kunvenoj kaj manifestacioj, petskribojn, apelaciojn, por ke oni organizu piedmarŝojn, por ke oni postulu de ĉefaj reprezentantoj de la registaroj praktikajn prizorgojn
por haltigi vetarmadon en ĉiuj formoj de agreso .

# internacia panoramo



## POLA OPERA

Dum la 23.-25. 10.'81 okazis en Varsovio jam konata OPERA - aranĝo plena de kulturo. Dum tiu ĉi okazo kunvenis ankaŭ reprezentantoj de kelkaj landoj kaj esperantaj organizoj por trakti estontecon de turistaj interŝanĝoj kaj enkonduko de Esperanto en turismo. Reprezentantoj de tiu ĉi kunveno komune traktis kun vicdirektoroj de pola turista agentejo JUVENTUR, kiu ankaŭ oficiale okupiĝas pri esperantaj aranĝoj.
Oni povas diri, ke kunveno estis sukcesa, estis preparitaj interesaj kontraktoj por novaj turistaj aranĝoj. Ankaŭ niaj geesperantistoj baldaŭ pli detale konatiĝos kun rezultoj sur paĝoj de nia Starto.
Dum ambaŭ aranĝoj ankaŭ Esperanta radio-elsendo de Varsovia radiostacio partoprenis kaj surbendigis informojn pri la kontraktoj kaj imagoj de partoprenantoj kaj pri la vivo kaj strukturo de Esperanto-organizoj, kies reprezentantoj tie ĉeestis.





Sur la foto : el kultura aranĝo de OPERA kaj reprezentantoj post la traktado pri turistiko komune pozas kun vicdirektoro de JUVENTUR /meze/.

## BRNO - BRATISLAVA - BUDAPEŜTO

La tradicia triurba renkontiĝo Brno-Bratislava-Budapeŝto /BBB/ okazis ĉi-foje en Bratislava, en la tagoj de la 16.10. - 18.10. 1981. Partoprenis proks. 90 personoj, ĉ. 40 el Budapeŝto, pli ol 30 el Slovakio, la resto el Brno kaj el pluraj ĉeĥaj urboj.
La interkona vespero estis solena, sian grandan arton prezentis tri folkloraj dancensembloj el tri slovakaj regionoj, muzikaj programeroj, paroloj. Enkondukis kaj gvidis Z. Bednaříková. Sabate posttagmeze trarigardo de la urbo, de la primasa palaco k.a. vespere amika renkontiĝo kun danco. Dimanĉe ekskurso al Děvín.
Bela, senmanka renkontiĝo.

## ESPERANTIGO DE MALNOVĈEĤAJ TEKSTOJ POR BELGIO

La delegitoj de UEA plenumas taskojn tre diversajn, eĉ kuriozajn. Inter ilin apartenas peto de scienca instituio en Belgio liveri specimenojn de malnovĉeĥaj tekstoj kun traduko en Esperanto! Laborantoj de la Akademio de Sciencoj prizorgis por la delegito arĥ. J. Drlík specimenajn tekstojn kaj tiu faris la provtradukon kaj la ceteron J. Mařík, kiu devis ankaŭ konsulti la malnovĉeĥan sekcion de la Instituto por la ĉeĥa lingvo pri pluraj terminoj. Tiel povis esti liveritaj en Belgion dulingvaj tekstoj de "Hospodine, pomiluj ny" /Disinjoro, indulgu nin, el 10-a jarc./, "Konsiloj de Aristotelo" el "Alexandreis" /j.1300/, la himno "Sankta Venceslao" kaj la adiaŭa letero de Mag. Jan Hus el Konstanz al la fidelaj ĉeĥoj /1415/.

/jm/

En la sveda Esperanto-gazeto LA ESPERO /N-ro 5/81/ je nia vera ĝojo estis represitaj du desegnaĵoj de Pavel Rak el dua numero /'81/ de STARTO.

## ĜEMELIĜO KUN VOLGOGRAD

Esperantoklubo ĉe Domo de kulturo en ferfabriko Vítkovice jam dum tri jaroj ĝemeliĝas kun Esperantorondeto ĉe Domo de kulturo Kaustik en Vogograd. En la tagoj 4. - 15. 10. 1981 vizite venis 29-jara inĝeniero Alexandr Miĥajlov, reprezentanto de la Klubo. Post alveturo li vizitis salonon de tradicioj kaj muzeon de nia fabriko. Vespere ni partoprenis koncerton de folklora kolektivo Čarda kaj blovmuzika orkestro Ostravan en Domo de kulturo. Ni estis ankaŭ akceptitaj ĉe urba komitato de Ĉeĥoslovaka - Sovetunia amikeco. Tie li ricevis fotoalbumon por transdoni ĝin al funkciuloj de Sovetunia - Ĉeĥoslovaka amikeco en Vogograd.

Ni montris al li monumenton de militoperacio Ostrava en Hrabyně, skanzenon en Štítina, muzeon de militoperacio en Kravaře kaj haltiĝis ĉe tombejo de sovetaj soldatoj en Hlučín. Li vidis montaron Bezkydy kaj muzeon de aŭtomobiloj en Kopřivnice. En Societa domo en Vítkovice ni preparis prelegon pri la urbo Volgograd. La metilernantoj de nia fabriko interese diskutis sub nia organizo kun nia ŝatata gasto. Je la fino de lia vizito li estis akceptita ĉe la direktoro de Domo de kulturo.

Lia vizito estis por niaj membroj granda kuraĝigo en plua studado kaj laboro. La vizito kontribuis al nia intenco serĉi novajn formojn por plua disvolviĝo de nia ĝemeliĝo.

Drahomír Kočvara

## I F E R '82

La gesamideanoj el Leipzig /GDR/ vin tre kore invitas partopreni IFER '82, kiu okazos dum la tagoj 12a-14a de marto en ilia urbego. Tradicie IFER estas aranĝata sub certa ĝenerala temo. En 1982 ĝi estos "Goethe - Faŭsto - Leipzig". Kotizo 110 M inkluzivas tranoktojn kaj manĝaĵon. Oni povas rekte pagi pere de SBČS en la loĝurbo al Staatsbank der DDR, Leipzig, Kontonumero 5621 - 32 - 53. Simbolo por pago estas 329 - 2849. Aliĝon kaj detalajn informojn petu je adreso: Kulturbund der DDR, Organiza komitato de IFER, Käthe-Kollwitz-Strasse 115, DDR 701 - L E I P Z I G .




ZAPLATILI JSTE JIŽ SVŮJ ČLENSKÝ PŘÍSPĚVEK PRO ROK 1982 ? UČIŇTE TO CO NEJDŘÍVE - BUDE TO I VÁŠ PŘÍSPĚVEK K PŘEDSJEZDOVÝM PŘÍPRAVÁM. CHCEME PŘEKROČIT HRANICI 3000 PLATÍCÍCH ČLENŮ. P O M Ů Ž E T E I V Y ?

Rozhodněte se pro vyšší kategorii členských příspěvků:

skupina B - studenti, ženy v domácnosti, důchodci a ostatní s příjmem do 1000 Kčs - příspěvek 30 Kčs ročně


skupina A - ostatní-členský příspěvek - 60 Kčs ročně

skupina F - doživotní členství - jednorázový příspěvek Kčs 600

skupina C - příznivec svazu s čl.příspěvkem min. 100 Kčs

Vzhledem ke stále se zvyšujícím nákladům, nebudeme moci zřejmě v příštích letech členům kategorie D a E /příspěvek 15 Kčs ročně/ poskytovat služby a materiály jako dříve, pokud by nedošlo k úpravě svazových ročních členských příspěvků.

\- - -



## ni recenzas

ĈU LI VENIS TRAKOSME ? Prunte de amiko venis en miajn manojn romano de Johán Valano kun la supra titolo, eldonita de Stafeto Antverpeno - La Laguna 1980. Sur 144 paĝoj de formato 15 x 21 cm disvolviĝas antaŭ ni detektivromano de aprezebla kvalito de similaj verkoj en la naciaj lingvoj. Kelkaj fantaziaj trajtoj de sciencfikcia karaktero aldonas kromguston al la leginde streĉa libro. La libron plivalorigas tre bona noderna lingvaĵo, kiu atestas pri la lingva kulturo de la sperta aŭtoro. La verkinto plaĉe eluzas koncizigajn adverbajn formojn kiel ekz. "liadome" ks. Kelkfoje li kurtigas per freŝsencaj verbigoj kiel ekz. "ŝtuparis, alsupri, alvali, varmvoĉis, kapuĉante". Ĉiuj, eĉ se nekutimaj, estas ĉie en kunteksto tuj kompreneblaj kaj taŭgaj. Unuloke mi trovis eĉ neuzatan kondicionalan participon "ĉeestunto".

Resume, la originala romano prezentas interesan distran legaĵon kaj salutindan pliriĉigon de nia literaturo, en kiu forestas lingvaj malkorektaĵoj kaj tre malabundas preseraroj.

Jiří Kořínek

Hergé: LA KRABO KUN ORAJ PINĈILOJ. /Aventuroj de Tinĉjo./ Traduko de Hervé Gonin. Kolora desegnita albumo, formato 23 x 30,5 cm, paĝoj 62, prezo ne indikita.

La aventuroj de Tinĉjo kaj lia hundo Miluo estas la kreaĵo de belga desegnisto Hergé. Ili ampleksas 22 albumojn, kies su-




ma eldonkvanto multe preterpasis 60 milionojn da ekzempleroj. Ili estas tradukitaj al 30 lingvoj - kaj nun unuan fojon en Esperanto.

Ĉi tiu libro estas destinita ĉefe por junaj legantoj, ĝi estas plena de streĉo, surprizo, humuro. Tinĉjo hazarde malkovras spurojn de internacia grupo de drog-ŝakristoj, li sekvas tiujn spurojn kaj juna leganto travivas kun li multajn aventurojn sur vaporŝipego, en eta boato meze de oceano, en aviadilo, en dezerto kaj fine solvas ĉion en mallarĝaj stratetoj de iu araba urbo.

Eldonantoj prave esperas, ke ĉi tiu amuza legaĵo helpos al pli bona diskonigo de la lingvo de D-ro Zamenhof.

Pavel Rak

## )Lingva angulo(

DUDEKO DA FAKAJ VORTOJ POR PRAKTIKA UZO /2/

Laŭ novtempaj fontoj komunikas Inĝ. J. Werner

dubelo - hmoždinka
dubeli /tr/ - kotvit pomocí hmoždinky
ĉizoji /tr/ - 1. stříhat /plech/, 2. křížit /v dopravě/
hirundvosta junto - rybinový spoj
junto per foldo kaj lango - spojení na drážku a pero
jako - zdířka /el. tech./
maso - hmotnost /hovorově: váha/
ŝeklo - třmen; závěsné oko
akcesora unito - vedlejší jednotka
varleto - stolařská svěrka
vidverko - výtyčka, trasírka
oksido - kysličník
dunitra oksido - kysličník dusný /$N_2O$/
karbona oksido - kysličník uhelnatý /CO/
dufera trioksido - kysličník železitý /$Fe_2O_3$/
silicia duoksido - kysličník křemičitý /$SiO_2$/
dufosfa kvinoksido - kysličník fosforečný /$P_2O_5$/
sulfa trioksido - kysličník sírový /$SO_3$/
dumangana sepoksido - kysličník manganistý /$Mn_2O_7$/
osmia kvaroksido - kysličník osmičelý /$OsO_4$/



## A R T A SEKCIO de ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO
## U M Ě L E C K Á SEKCE ČESKÉHO ESPERANTSKÉHO SVAZU

Ekde decembro 1981 kaj en la venonta jaro ni kunvenados en tre bela klubejo en PLATÝZ, enirejo el Národní třída 37 /trairejo/ r e g u l e ĉiun duan ĵaŭdon de la monato en la klubejo de la entreprena klubo PRODEX, kiu nin tre afable gastakceptis. Je nia dispono tie estas 40 sidlokoj. Kiu serioze interesiĝos pri niaj programoj, bv.sin anonci ĉe la sekretario de la sekcio J. Karen, 108 00 Praha 10, Počernická 333/86

P l a n o de la agado por decembro '81 - junio '82:

La 10an de decembro 1981 je 17,15 - 19,15 h. kunesto kun esp. aŭtoro Karlo P í č el Litomyšl, kies originala sci-fi romano en Esperanto aperis antaŭ nelonge. Kun Eva Seemannová li tralegos partojn de sia romano kaj pridiskutos la temon: Problemoj de nuntempa esper. romano.

La 14an de januaro 1982 kunesto kun meritplena artisto PhD-ro František K o ž í k kaj lia proza arto. Literatura medaliono: J. Rumler, specimenojn el la verko prezentos E.Seemannová kaj geedzoj Budinský. Interparolo kun la aŭtoro, subskribado de liaj libroverkoj.

La 11an de februaro kunesto kun verkisto Ota D u b, aŭtoro de romanoj el medicinistaj medioj. Li verkis por ni la rakonton "Estas mi aŭ ne estas la bestio?"

La 11an de marto festos sian gravan vivjubileon esp.poetino Eli U r b a n o v á... Nia gratulbukedo estos vespero el ŝia plej nova arto okaze de la eldono de ŝia poemaro en Panoramo.


La 8an de aprilo renkontiĝo kun meritplena artistino Miroslava T o m a n o v á. Estos prezentita ŝia verko ROZJÍMÁNÍ O NEZVĚSTNÉM kunlabore kun la komponisto J.F. N o v á k, kiu la programon akompanos per specimenoj el sia komponado.

La 13an de majo A m- kaj f a m i l i a j m o t i v o j en la poezio de nuntempaj verkistoj - esperantistoj.

La 10an de junio La 60jara vivjubileo de verkisto J. R u m l e r. Al liaj literaturaj geamikoj kaj esperantistoj estos prezentitaj liaj verkaĵoj. Mem la aŭtoro: Esperanto kiel literatura lingvo kaj la graveco de tiu ĉi fakto por nia socialisma literaturo.

Ĉiuj programoj:h.17,15 - 19,15 en la klubejo Prodex en PLATÝZ

## SCIENCA - TEĤNIKA SEKCIO DE Ĉ E A



Redaktas: V. Novobilský, Školní 5, CS-400 01 Ústí nad Labem

Ekde tiu ĉi vi trovos en ĉiu venonta numero de Starto rubrikon pri agado de la scienca-teĥnika sekcio de ĈEA kaj pri la internaciaj aplikoj de Esperanto sur kampo de scienco kaj teĥniko. Kontribuaĵojn por la rubriko sendu al adreso de la redaktanto.

\- - -

Scienca-teĥnika sekcio /STS/ de ĈEA kunigas interesatojn pri sciencaj kaj teĥnikaj aplikoj de la internacia lingvo Esperanto. Por membroj de ĈEA estas membreco en STS senpaga. La laboron de STS gvidas 5 membra komitato:

prezidanto - d-ro, inĝ. Ludvík Fritsch, Gorkého 10, CS-370 01 České Budějovice
vicprezidanto - doc. d-ro V. Novobilský, CSc. /adreson vidu supre/
sekretario - Jiří Laube, Alej Rudé armády 811, CS-413 01 Roudnice nad Labem
lingva komisiito - inĝ. Zdeněk Pluhař, CS 507 51 Holovousy v Podkrkonoší 109
komisiito pri fakaj grupoj - František Hort, Palackého 764 CS-563 01 Lanškroun.

La komitato preparas eldonon de la nova membro-listo. Laboro sur tereno de sciencaj kaj fakaj aplikoj de Esperanto estas grava kaj moderna por- kaj peresperanta agadoj. Bonvolu pripensi eblon aliĝi al nia sekcio kaj aktive labori en iu el la fakaj grupoj. Skribu al la adreso de STS-sekretario, s-ano J.Laube.

- - -

La 17an de oktobro 1981 okazis en Praha komitata kunveno de STS, kies ĉeftemo estis Seminario pri apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko - SAEST '82. Ĝi okazos semajnfine 1982-08-13/15 en la sudbohemia urbo České Budějovice, ČSSR. Temo elektita por la seminario estas:

ENERGIO - LA TUTMONDA PROBLEMO

/plibonigitaj kaj novaj metodoj de energi-produktado, metodoj de pli efika energi-uzado, ŝparmetodoj, konstruado de energetike pli efikaj maŝinoj, rilato de la hom-sano kaj energi-konsumo, ktp./ La dua parto de SAEST '82 estos dediĉita al problemoj de faka terminologio kaj faka traduko.

Limdato por aliĝoj de ĉiuj prelegontoj estas la 28a de februaro 1982. La sama limdato validas ankaŭ por akcepto de manuskriptoj de la prezentotaj prelegoj en amplekso de 8 - 10 tajpitaj paĝoj laŭ specialaj instrukcioj. La aliĝojn sendu al kaj la instrukciojn petu de:

Český esperantský svaz, Jilská 10, CS - 110 01 P r a h a 1.

Laŭ la instrukcioj pretigitajn manuskriptojn sendu al:
doc. d-ro V. Novobilský, CSc., Školní 5, CS-400 01 Ústí n.L.

Ĉiuj ceteraj partoprenontoj povas aliĝi ĝis la 30a de junio 1982.

Se vi deziras, ke via prelego aperu en la planata almanako, kiu estos dissendita al ĉiu partoprenonto antaŭ la seminario, bonvolu certigi, ke la adresato ricevu vian manuskripton plej malfrue fine de februaro 1982.

La partoprenontoj loĝos en moderna studenta kolegio kaj kunsidos en novkonstruita urba kulturdomo. La detalojn koncerne prezojn ktp. bonvolu sekvi en la venontaj numeroj de Starto kaj Budapeŝta Informilo.



# el fervojista movado

Sekce železničářů dostala několik odpovědí na články otištěné v posledních číslech Starta. Odpověděli převážně dlouholetí členové sekce. Těm chceme poděkovat za jejich věrnost k sekci i přes potíže, jež byly v poslední době. Dostali jsme odpovědi od nových zájemců o členství v sekci. Odpovídáme jim, že SŽ je jednou ze sekcí ČES, jejíž cílem je sdružovat železničáře - esperantisty a propagovat tento jazyk na železnici. Podmínkou pro členství je být členem ČES. Zvláštní příspěvky pro sekci nejsou. Sekce je řízena a spolupracuje s obdobnými sekcemi v zahraničí. Jednou z příležitostí jak se zapojit do práce v sekci, je práce v Názvoslovné komisi při tvorbě železničářských termínů.

Ze zpráv ve Startu také víte, že v Praze byl p.Giessner, předseda IFEF, který potvrdil spolupráci naší Sekce železničářů s touto mezinárodní organizací. Další dotazy od členů jsou na možnost předplatného časopisu IF. Tento časopis je vydávaný v zahraničí. V současné době probíhá jednání o možnosti předplatného. Jakmile budeme více vědět, podáme informaci. Dostali jsme také několik přihlášek na 34. kongres IFEF. Odpověděli jsme informačním listem. Přihlášky vyplníme za Vás. Všechny pak pošleme najednou do Maďarska. Zájezd budete platit v Kčs.

Závěrem máme ještě prosbu. Protože tím ušetříte mezipráci a výdaje, pište své dopisy přímo na adresu: Jaroslav KAŠPAREC, Vlkova ul. 30, 130 00 Praha 3.

Výbor SŽ

## PRVDA a VÝMYSLY...

Ve Starto č.4/81 jsme uveřejnili některé informace o dohodě mezi IFEF a ČES týkající se budoucí spolupráce v železničářském hnutí v naší republice. Chceme vás informovat,že tuto dohodu jsme projednali se zástupci Zväzu esperantistov SSR ,kteří se k ní v plné míře připojují. Protože byl zájem ze strany našich členů znát její plný text a protože zástupci t.zv.ČSFEF tehdy reprezentovaného Miloslavem Blažkem nyní znovu nejenom že odmítají tuto dohodu plnit , ale snaží se opět desorientovat některé železničáře - esperantisty v ČSSR a narušovat jejich činnost , uvádíme text protokolu z jednání. Posuďte sami...

Zároveň vás vyzýváme, abyste si neobjednávali časopis IF ani u bývalé členky svazu Helmecyové či Kollára ani u jiného"soukromníka" či pseudoorganizace železničářů. Od příštího roku, dle dohody s IFEF budete časopis dostávat z našeho svazu a to b e z p l a t n ě / pouze za úhradu expedičních nákladů/.

Vaše objednávky zasílejte přímo na adresu svazu a to co nejdříve. Voláme všechny železničáře- esperantisty ke spolupráci a k pomoci organizovat mnoho akcí,které jsou v plánu. Dále je uveden text zápisu o jednání ze dne 6.8.1981.

## P r o t o k o l o

pri traktado inter reprezentantoj de ĈEA kaj IFEF dum 6.8.1981 en Praha

Partoprenantoj : Joachim Giessner — prezidanto de IFEF
Dr. Jaromír Jermář CSc — prezidanto de ĈEA
Zdenko Křimský — sekretario de ĈEA
Jaromír Babička — Fervojista sekcio de ĈEA
Miloslav Blažek — reprezentanto de t.n.ČSFEF

Partoprenantoj kunvenis por solvi nunan situacion en la fervojista movado de ČSR. Post klarigo de starpunktoj estis unuanime akceptitaj sekvantaj punktoj kaj decidoj :

1. Oni devas en la agado de fervojistoj-esperantistoj priatenti la ĉeĥoslovakaj leĝoj.
2. Fervojistan movadon esperantistan eksterlande kaj enlande reprezentas Fervojista sekcio de ĈEA en ČSR kaj en Slovakio oni poste traktos simile.
3. Estraro de IFEF traktos rekte kun ministerio de eksterlandaj aferoj de ČSSR aferojn kun individuaj membroj de IFEF en nia lando.
4. ĈEA estonte rekte distribuos la Internacian Fervojiston kaj laŭ la sliparo,kiun donos al asocio IFEF, prizorgos ĈEA ankaŭ estonte la aferon kun abono. Temas pri sliparo de abonantoj.
5. IFEF sendos al adreso de ĈEA sume 60 da ekzempleroj de IF.
6. Ĝis estos ordigita la situacio kun fervojista movado kaj ĝis estos elektita gvidkomisiono de ambaŭ asocioj, IFEF traktos kun prezidanto de Fervojista sekcio de ĈEA.
7. Ambaŭ partneroj havas intereson profundigi reciprokan kunlaboron.
8. S-ano Blažek traktos enhavon de tiuĉi protokolo kun la fervojistoj,kiuj ĝis nun staras ekster kun celo,ke ili kunlaboru en la kadro kaj esenco de tiu ĉi protokolo en Fervojista sekcio de ambaŭ asocioj.

Subskriboj

## el leterkesto

**SALUTO DE LA GEEDZOJ S E P P I K**

Redaktante la verkon de D-ro S. Kamarýt pri la historio de Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio mi pere de s-ano A. Aruoja kontaktis kun la geedzoj Henriko kaj Erika Seppik. Ili loĝas en Tallinn kaj daŭre estas esperantistoj kun varmega koro. Ambaŭ rememoras la belegan tempon en nia lando kaj salutas ĉiujn siajn iamajn gelernantojn kaj amikojn.

we



**VOLGOGRADA E-KLUBO organizas grandan p o r p a c a n ekspozicion en majo 1982. Bonvolu sendi ĉion, ankaŭ afiŝojn, desegnaĵojn laŭ la adreso: SSSR 4000 26 V O L G O G R A D - 26, Bulvar Engelsa ,1 a, DK Ĥimik, Esperanto-Klub, Sovetunio. Rekompence ĉiu sendinto ricevos aĵojn pri Volgogrado kaj novan pentraĵ-panoramon "Stalingrada batalo".**

**Sendante siajn donacojn al niaj fratoj en Vjetnamio vera internaciisto Antonín M l č á k el Štíty salutas ĉiujn legantojn de nia STARTO, deziras multe da sano, feliĉo,kontento...**

**Sian dankon pro morala kaj materia subteno esprimas**

**la r e d a k c i o**

**El unu letero...**

**El la letero de senlabora hispana esperantisto ni publikigas ĉefajn partojn. Ankaŭ vi povas helpi per monkolekto por aĉeto de libroj, kiuj multe helpus. Serĉu ankaŭ aliajn formojn kaj eblecojn kaj komuniku ilin al ni. Viajn donacojn ni kontigos en la Fonduso de solidareco kaj la nomojn de donacintoj ni laŭdezire publikigos.**

**La 2an de nov.'81**

**Tre estimata amiko Křimský kaj ceteraj kamaradoj!**

**Bonorde mi ricevis vian leteron de la 14a de okt.'81. Ankaŭ mi ricevis la senditajn librojn. Krom la valoron de la libroj mi multe taksas vian solidaran agon, kiu vere stimulas min pri la kredo je homa solidareco. Parton el tiuj libroj mi jam disvendis. Dankon denove. Evidente nia vivo ne estas rozkolora, sed ni ne troviĝas en tiu malbona situacio, en kiu troviĝas aliaj. Mi ne plu ricevas ŝtatan helpon, sed nun mi ŝirmiĝis en la Sociala sekureco, kio signifas, ke mi ankoraŭ ricevas monan kaj ekonomian helpon...Tamen mi ne scias ĝis kiam daŭros ĉi tiu situacio. Kio estos poste? Mi ne povas respondi kaj tiu malcerteco pri la estonto estas kio maltrankviligas malfeliĉe la homojn en ĉi tiu lando....**

**Stranga afero estas la malapero de la letero,en kiu mi kunsendis kritikan opinion rilate Walesa, skribaĵo, kiun mi sendis al Pola E-Asocio por ĝia publikigo en E aŭ kiu ajn lingvo. Bedaŭrinde kaj danke al ĉi tiu burĝa demokrata strukturo ekzistanta nuntempe en Hispanujo, la popolo rajtas diri nenion pri la integriĝo de Hispanujo en NATO kaj fakte venontjare ni jam estos en tiu milita bloko.Vero estas,ke la maldekstrulaj fortoj luktas kontraŭ tiu aliĝo, sed laŭ mia opinio nesufiĉe...**

**Mi esperas ke vi fartas tute sane,kion mi ja deziras al ĉiuj viaj proksimuloj.**


**Amike via L.S. P.**

**P o d ě k o v á n í**

**Za dary svazu upřímně děkujeme těmto dárcům:**

**A. Mlčák, Štíty 150 Kčs; R. Tomíček, Karviná Kčs 180; St. Linhart 50 Kčs; J.David, Prostějov 12 Kčs.**

## INFORMOJ EL SEKRETARIEJO



### ÚČAST NA 67. SVĚTOVÉM KONGRESU ESPERANTA V ANTVERPÁCH.

Jak jsme vás již informovali v minulém čísle našeho časopisu, počítáme s autokarovým tématickým zájezdem asi 40 osob na uvedený kongres v Antverpách. Předpokládáme, že pojedeme přes NDR, NSR do Belgie, odtud podnikneme výlet také do Holandska s návštěvou hrobu J. A. Komenského a po Belgii v rámci vlastního pobytu. Cestou zpět bychom navštívili Lucembursko a Francii a vrátili se opět přes NSR a NDR domů. Zájezd bude asi 14ti denní. Cena bude asi mezi 12 - 15 tis. Kčs včetně kapesného.

## MAGNETOFONA SERVO

Nia sekretariejo havas je via dispono magnetofonajn sonbendojn /kasedojn/ kun prelegoj, kiujn vi povas elprunti por via memstudado aŭ propagando en via klubo. Pruntkotizo por 1 sonbendo kaj semajno estas nur 10 Kčs plus sendkostoj. Sonbendojn ni sendas nur registrite

P r e l e g o j:

1. D-ro Jaromír Jermář: Nacia lingvo - nacia kulturo. Internacia lingvo - internacia kulturo. IIIa Esperantologia Konferenco, UK 1980 Stokholmo /kun diskuto 50 minutoj/.
2. Violin Oljanov: Bulgaraj laboristaj esperantistoj en la batalo por libera Bulgario /30 min./, IIIa Centra Konferenco 1981 en Karl-Marx-Stadt,
   D-ro Věra Barandovská: Latinidaj elementoj en planlingvoj. 1978, int.seminario "Sciencaj aspektoj de Esperanto" en Ahrenshoop. Kun diskuto 30 min.
3. Vladimír Samodaj: Esperanto - traduklingvo. Sovetaj spertoj. IIIa Centra Konferenco, Karl-Marx-Stadt 1981, 50 min. kun diskuto.
4. D-ro Renato Corsetti: UEA kaj UNESCO. IIIa Centra Konferenco, Karl-Marx-Stadt 1981, 60 min.kun diskuto.
5. D-ro Ferenc Jaki: Esperanto - lingvo de la mondliteraturo. 1969 en Karl-Marx-Stadt /40 min./.
   Andrzej Tomecki kantas en Esperanto /20 min./.
6. E.A. Bokarev: La internacia lingvosituacio kaj eblecoj de ĝia raciigo, 1967 en Rostock /ĉirkaŭ 50 min./.
7. D-ro Detlev Blanke: Konfronta komparo de Esperanto kaj la germana. ISU-prelego 1977 en Rejkjaviko /kun diskuto 55 min./



8. Ivo Lapenna: Historio de CED - 50 minutoj.
9. Eva Seemannová /Anna Seghers/: La ekskurso de la mortintaj knabinoj-60 minutoj.
10. Ing. D-ro Ludvík Fritsch: Teknikaj vortaroj en Esperanto.
    D-ro J. Kavka: ISAE-apliko de Esperanto.

\- - -

SVAZOVÉ Z K O U Š K Y v jarním termínu budou uskutečněny v sobotu 3. dubna 1982 v 10 hodin v Pardubicích v Kulturním domě ROH na Dukle. U z á v ě r k a p ř i h l á š e k: 1. února 1982.

\- - -

En "Ilustrita enciklopedia vortaro" /Ilustrovaný encyklopedický slovník/, kies unua volumo aperis en 1980 ĉe eldonejo Academia far Enciklopedia instituto de Ĉeĥoslovaka akademio de sciencoj aperas jena difino de kapvorto Esperanto:

"Esperanto /Esper-ant-o, doufající/, artefarita internacia lingvo kreita 1887 de varsovia kuracisto L. Zamenhof /1859 - 1917/ surbaze de la plej disvastiĝintaj eŭropaj lingvoj. En Esperanto ekzistas originala literaturo kaj tradukoj, ĝi estas uzata en la teĥnika kaj scienca dokumentado, estas rekonata de multaj internaciaj organizaĵoj." V.N.

\- - -

Organo de la Nordbohemia regiona komitato de KPĈ "Průboj" aperigis la 16an de septembro 1981 intervjuon kun docento V. Novobilský sub titolo "Problemoj de lingva interkomprenigo en scienco kaj teĥniko". Ĝi resumas rezultojn de la internaciaj seminarioj pri apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko 1980 /Ústí n.L./ kaj 1981 /Žilina/ kaj detale traktas spertojn sur kampo de lingva interkompreniĝo, kiujn docento Novobilský rikoltis dum sia junia deĵorvojaĝo al Usono, kie li estis oficiala gasto de Internacia konferenco pri fosforkemio en Duke-Universitato, Durham, Norda Karolino. La konkludoj en la artikolo elvokis viglan interesiĝon en la fakaj medioj.

\- - -

V. Leraus kaj Esperanto. La redaktantoj de la Historio de la Esperanto-Movado en ČSSR /eldonota en 1982/ devas koresponde peti multajn personojn pri iliaj vivodatoj. Vladimír Leraus, membro de la Nacia teatro en Praha, aldonis en sia respondo al J. Mařík: "Domaĝe, ke la Esperanto-radiosendoj silentiĝis. Ili bele startis en Brno. Vi espereble revivigos ilin?! Kore salutas via V.L." /jm/

\- - -

La semajna revuo Naše rodina, n-ro 27/1981, aperigis en sia porinfana paĝo 20-linian informon "Kio estas Esperanto", de "dš".

La prestiĝa semajna revuo "Květy publikigis /n-ro 40,p.40/ artikolon de J. Mařík "Esperanto - ponto en la mondon", kun interesaj argumentoj.

\- - -

DEMOSTA en Esperanto. Ankaŭ en 1981 aperis la bulteno por demografio kaj statistiko /Statistika ofico de ČSSR/ kun subtitolo en ses lingvoj, inkluzive E-on, tamen kun tekstoj anglalingvaj kaj parte nur en Esperanto. /jm/

\- - -

Ni atentigas tiujn, kiuj interesiĝas pri la kunlaboro kun gvidaj organoj de nia asocio kaj tiel pri pli profunda ekkono de "nia esp. kuirejo", ke ili aliĝu al estroj de diversaj komisionoj kaj sekcioj de ČEA. Nur la intereso ne sufiĉas, sed ankaŭ iomaj spertoj estas bezonaj, same guto da organizkapablo. Kelkaj komisionoj /lingva kaj literatura speciale/ bezonas profundan lingvoscion. Ni bezonas kompletigi turisman, lingvan, por informado kaj propagando kaj junularan komisionojn. Ankaŭ niaj sekcioj konstante serĉas siajn kunlaborantojn. Elektu kaj aliĝu al la laboro en medicinista, fervojista, sciencteĥnika, pedagogia, porpaca, arta, blindula sekcioj... Vian aliĝon sendu al la adreso de la asocia sekretario, kiu ĝin senprokraste transdonos al estro de koncerna sekcio. La respondo vin informos pli detale kaj intime. Eĉ malgranda plenumita tasko helpas al la asocio, al la movado kaj ankaŭ al vi!

\- - -

<u>Denove ni atentigas</u> interesulojn pri ĉiĉerona deĵorado ĉe REKREA, ke aliĝe ili devas plenumi jenajn kondiĉojn:
- havi de sia laborloko konsenton pri dua laborokupo,
- havi de centra kartoteko ateston pri sia senpuneco.

Kun la skiza priskribo de via vivo vi sendos esprimon de via intereso kun ambaŭ dokumentoj al DCK REKREA, Revoluční 13, Praha 1,110 00. Ne forgesu noti, ke temas pri Esperanto. Bona estas via eventuala kono de almenaŭ unu mondlingvo /rusa, germana, angla, franca, hispana/. Vi trapasos nelongan specialan kurson por ĉiĉeronoj kaj laŭ la kontrakto inter REKREA kaj ČEA vi poste estos invitita gvidi eksterlandajn turistojn.

Novaj limdatoj por akcepti viajn raportojn aŭ artikolojn por STARTO en 1982:

| | | |
|---|---|---|
| n-ro 1 : 30.1. | n-ro 2 : 27.3. | n-ro 3 : 22.5. |
| n-ro 4 : 17.7. | n-ro 5 : 10.9. | n-ro 6 : 5.11. |

Estas ja konata fakto, ke bone redaktata surstrata vitrokesto estas utila propagandilo. Ni laŭdas kaj gratulas tiusence al la Esperantista Klubo en Praha. Sur la foto unu vitrokesto propagandas la 66-an UK en Brazilo.




Sekretariát dostává řadu korespondence se zajímavými filatelistickými raritami z celého světa. Našel by se zájemce, který by se nezištně zabýval prodejem těchto cenin ve prospěch svazu?

\- - -

<u>Rezultoj de nia praktika kunlaboro</u>

Nia Asocio ricevis leteron de nia Federacia ministerio por eksterlandaj aferoj, datitan la 12.10.'81, en kiu oni notas:

... okaze de la komenco de nova lerneja jaro vizitis la reprezentanto de ĉeĥoslovaka ambasadorejo en Hanoi bazan lernejon n-ro 27 Han Long kaj transdonis al la direktoro de la lernejo vian donacon. Dum la interparolo, kiu post oficiala malfermo de la lernjaro ekregis, petis la lernejgvidantoj, ke ni transdonu varmajn dankojn por senditaj donacoj... En la lernejo lernas 20 gejunuloj Esperanton. Instruisto de Esperanto esprimis intencon en iu el estontaj jaroj partopreni Someran Esperanto-Tendaron en Lanĉov. Tial ni volus pere de tiu ĉi letero peti pri informoj rilate la partoprenon en SET. Pere de nia ambasadorejo ni transdonos ilin al reprezentantoj de la lernejo.

V. K u b á t p.m.
estro de 3a fako
de la ministerio




Noto de la redakcio:

Nia Asocio respondis ne nur je demandoj, sed ankaŭ invitis la instruiston de Esperanto kaj la plej diligentan lernanton kiel gastojn de nia Asocio en nian landon por estonta jaro.

\- - -

La Itala Radio /RADIO ROMA - RAI/ elsendas en Esperanto ĉiun SABATON je horo 20 laŭ grenviĉa tempo /GMT/, kio egalas al horo 21 laŭ mez-eŭropa tempo /MET/. Frekvencoj/ondlongoj:

| | | | |
|---|---|---|---|
| kilohercoj /kHz/ | 1180 | 9710 | 7275 |
| metroj /m/ | 25.42 | 30.90 | 41.24 |

Adreso: RADIO ROMA, Esperanto, C.P. 320, I-00100 ROMA CENTRO CORR., Italio.
Al raportoj pri aŭskulto oni respondas per konfirmo-kartoj/QSL/ en Esperanto.
Nur korespondaĵoj pruvas, ke iu radio-elsendo estas aŭskultata, a ke, almenaŭ, oni deziras aŭskulti ĝin.
Se oni sendas plurajn raportojn de aŭskulto samtempe, oni bonvolu skribi ilin sur apartaj folioj. Oni ĉiam aldonu la adreson, klare legeblan, por plifaciligi nian respondon.

La 2o-an de decembro 1981 ni memoris la unuan datrevenon de la morto de nia bona amiko, samideano Václav Müller el Šumperk. Samideano V. Müller eĉ en sia alta aĝo senĉese aktive helpis al E-o klubo en Šumperk kiel bonkora kaj ege pacienca E-instruisto, kvankam li jam ne estis sana, sed ĉiam tre efermema.

Rybáčková

**Esperanto**

Eva Seemannova, een actrice uit Praag, vertelt vanavond Silezische volksverhalen in het Nivon-nus aan de Smetanastraat.

Zij doet dit op uitnodiging van de afdeling Almelo van de bond van arbeiders-asperantisten.

Er wordt vanavond voor vertaling vanuit het esperanto in het Nederlands gezorgd. De toegang is gratis. De aanvang is acht uur.

**Esparanto voorstelling**

In het Dienstencentrum aan de Prins Bernhardlaan in Zuilen zal vanavond vanaf zeven uur de Praagse actrice Eva Senmanova in de wereldtaal Esparanto een voorstelling geven. Het evenement gaat uit van het Utrechts Esparanto Comité. Toegang is gratis.

**Silezische verhalen**

ALMELO - De bond van arbeiders-esperantisten F.L.E. houdt donderdag 5 november een avond in het Nivonnus aan de Smetanastraat.

De Praagse actrice Eva Seemanová brengt die avond Silezische volksverhalen in de klederdracht van dat land. Er wordt gezorgd voor vertaling. De toegang is gratis en de aanvang is 20 uur.

La esperanta akterino de ĈEA Eva Seemannová estis invitita al Nederlando prezenti tie poemojn, prozajn verkojn kaj teatraĵojn por unu akterino. Invitis sin la Asocio de Laboristaj Esperantistoj F.L.E. kaj preparis por ŝi teatran rondvojaĝon tra Hilversumo, Almelo, Utreĥto, Lage Wuurche, Haago kaj Amsterdamo. Kun granda sukceso prezentis Eva Seemannová tradukojn de nia ĉeĥa poezio, originalaĵojn de Eli Urbanová kaj Apokrifojn de Karel Ĉapek en traduko de J.Vondroušek. Tamen plej grandajn sukceson, aplaŭdon kaj admiron rikoltis la pamfleta minidramo de V. Vinař "Ĉerande de l'abismo" kaj la "Sileziaj fabeloj" de F.Lazecký. La alvenon de Eva Seemannová anoncis nederlandaj gazetoj "Dagblad van het Osten", "Utrechts Nieuwsblad", "Twenth" k.a.

## Sociologia esploro

Kelke da faktoj el nia Sociologia esploro de sintenoj al Esperanto:
Kategorio II. estas asociaj membroj
Kategorio III. estas homoj kiuj aliĝas al E-o kursoj /do tiu kiuj ne konas movadon/.
Nuntempa situacio:

| laŭ la aĝo | II. | III. |
|---|---|---|
| ĝis 35 jaroj | 45.6 | 73.o |
| 36 ĝis 45 jaroj | 12.o | 14.o |
| 46 kaj pli | 3o.4 | 13.o |
| pliaĝaj ol 56 jaroj | 17.2 | -- |



| | | |
|---|---|---|
| **laŭ la familia stato:** | | |
| geframuloj | 3o.o | 45.9 |
| edziĝintoj | 56.5 | 43.1 |
| gevidvoj | 5.9 | 1.9 |
| eksiĝintoj | 7.6 | 8.7 |
| gepartneroj | -- | o.5 |
| **laŭ la sekso:** | | |
| viroj | 42.3 | 42.6 |
| virinoj | 57.7 | 57.4 |

Kio kondukis la demanditojn studi E-on aŭ okupiĝi pri ĝi:

| | | |
|---|---|---|
| preso | 22 | 6o |
| afiŝoj | 17 | 8 |
| amikoj,konatuloj | 4o | 14 |
| hazardaj aĉetoj de lernolibro | 4.5 | 3.3 |
| gepatroj | 1o.1 | 5.3 |
| io alia | 1o.6 | 8.9 |

Estas multe de pluaj interesaj informoj pri tiu esploro. Ni eldonis ĝin prese. Ĉiu povas ĝin mendi ĉe asocio. La prezo lo.- Kčs aŭ 2,5 gld.

## RONDETA VIVO

BRNO - La 6.10. 1981 komenciĝis nova kurso por komencantoj kun 17 personoj kaj kurso por progresintoj kun 10 personoj. Instruas ambaŭkurse J. Vondroušek.-La 13.10. 1981 aranĝis la klubo Vesperon kun silezia poeto kaj fabelisto František Lazecký. Horeton el poezio de la poeto kaj tri fabelojn, en Esperanto, nesupereble prezentis Eva Seemannová.

FRÝDEK-MÍSTEK - Ekspozicio de Esperanta literaturo estis aranĝita ekde la 14.9.-20.9.'81. Estis ekspoziciataj ĉ. 400 libroj, nome infanliteraturo,faka, beletro,originala kaj tradukita, inter ili ankaŭ la libro pri Hiroŝima. Ankaŭ estis projekciataj mallongaj filmoj en Esperanto kaj oni povis aŭdi el diskoj E-kantojn. La 20.9.'81 en kafejo Esperanto interese prelegis s-anino A. Milatová pri Pitoreska Istrio.

HAVLÍČKŮV BROD - La 26.kaj 27an de sept.'81,okaze de la Tago de fervojistoj,la ER ĉe Kultura klubo ČSD okazigis ekspozicion de filatelaĵoj en la Kultura salono de la stacidomo Havlíčkův Brod. A. Bartošík el Praha mem, kiu estas la posedanto de la jam kelkfoje per internaciaj premioj kaj medaloj honorigita kolekto, speciale temanta Esperanton,klarigadis al la interesuloj-pasaĝeroj la ekspoziciaĵojn. La vizitintoj estis kontentaj pro la pruvoj, koncernantaj la poŝtajn rilatojn al Esperanto, kvankam la ekspoziciitaj objektoj estis nur dekono de la tuto. Multaj surprize konstatis,ke ili la unuan fojon tiamaniere ekscias kaj aŭdas pri Esperanto. -eto

OPAVA - La Uzina Klubo Ostroj en Opava festis ĉi-jare la 30an datrevenon de sia fondiĝo.El inter la multaj rondetoj kaj artaj kolektivoj de la klubo elstaras la Esperanto-rondeto,kiu konscience kaj daŭre aktivas ĉe la UK Ostroj ĝuste 20 jarojn. Dum solena omaĝo de tiu ĉi datreveno de UK oni lau-

de menciis la laboron de tieaj esperantistoj.La prezidanto de la rondeto,inĝ. V. Kočvara, transprenis honoran diplomon, kiun por longdaŭra oferema laboro en la klubo gratifis al li la Distrikta Komitato de Komunista Partio en Opava. Pri tio oni skribis ankaŭ en loka gazetaro.

PRAHA - Okmembra kluba delegacio gvidata de d-ro R. Horský vizitis 18an de sept.'81 la tombon de prof.d-ro Stanislav Kamarýt kaj Zdenka Kamarýtová en Praha-Holešovice kaj rememoris per floroj kun klubaj rubandoj la 25-an datrevenon de la morto de S. Kamarýt, kunfondinto de la Klubo. Samsemajne la kluba kunveno rememoris la datrevenon. /jm/

ÚSTÍ nad LABEM - La 2an de okt. okazigis LG en Ústí n.L.solenan koncerton honore al la 75a naskiĝtago de tradukanto kaj originala poeto Jiří Kořínek kaj la 65a naskiĝtago de la kluba sekretario Antonín Šolc. En la enkonduka parolado resumis prezidanto de la klubo, docento V.Novobilský la vivoverkon de la jubileantoj kaj samtempe rememoris al la ĉeestintoj la 75an naskiĝtagon de d-ro Tomáš Pumpr, kiu koincidis kun la tago de la solenaĵo. En la arta programo rolis Jana Scholzeová, Miroslav Smyčka kaj Jan Zimmel /pianakompano/,ĉiuj membroj de la ŝtata operteatro en Ústí n.L.kaj Eva Seemannová el Praha. La programo,kiu estis varme akceptita, estis daŭrigita per diskuto kun J.Kořínek pri lia literatura laboro. - La 8an de oktobro komenciĝis en Ú.n.L.porkomencula E-kurso kun 12,plejparte junaj gekursanoj. Antaŭ la kurso estis dissenditaj dupaĝaj informleteroj kaj afiŝetoj al 120 urbaj entreprenoj kaj lernejoj. J.N.

ZNOJMO - Al letervespero aranĝita en septembro venis 41 leteroj el 12 landoj.-La 10an de sept.'81 komenciĝis E-kurso en agrokultura mezlernejo kaj en Kulturdomo. Partoprenas 29 personoj.

ŽAMBERK - Interesan dutagan E-renkontiĝon organizis LG sub gvidado de s-ano Čada.La programo por ambaŭ tagoj estis tre interesa: vizito de burgruinoj Litice,trarigardo de akvobarilo "Pastviny" kun faka komentario,bildgalerio en Rybná nad Zdobnicí.En unu punkto de bunta programo rakontis loka ĉasisto pri neceso ŝirmi naturon kaj rakontis pri siaj gajaj ĉasistaj travivaĵoj. Kun sia akordeona ludo kontribuis al la programo ankaŭ s-ano Straka kaj ceteraj. Dimanĉan antaŭtagmezon oni dediĉis al problemoj de E-laboro en LG. JPa

PRAHA

Bona kunlaboro inter du ĝemelaj E-o kluboj/ Praha-Berlín/ bone progresas. Fine de somero vizitis berlinanoj EK Praha / vidu la foton/ kaj dum novembro venis delegacio de praha klubu al Berlín por prelegi pri nia ĉefurbo.



## KRONIKO

František K ř e t i n s k ý el Ostrava-Poruba antaŭ nelonge forpasis.Li atingus en novembro sian okdekjariĝon.Daŭre li aktivis en nia movado...Honoron al li kaj nian dankemon!

- -



La 30an de aŭgusto 1981 estis invitita J. Kořínek, okaze de sia 75-jariĝo, al la kultura sekcio de nordbohemia Regiona nacia komitato. La unuhoran kunsidon gvidis sekciestro Václav Šmerda, kiu aprezis la tutvivan laboron de la jubileanto per honora diplomo, bildoriginalo kaj varma gratulo. En la diskuto la ĉeestantaro informiĝis pri la literatura laboro de J. Kořínek kaj esprimis sian favoran sintenon al Esperanto.

- -

Ĉi-pere mi dankas kore kaj sincere al ĉiuj gesamideanoj, unuopuloj kaj grupoj, kiuj bonvolis gratuli okaze de mia sepdekkvin-jariĝo. Pardonu, ke ne eblas al mi danki individue al la multaj.

Jiří Kořínek,
Ústí nad Labem

- -

Lastmomente ni eksciis, ke forpasis nin konata soveta esperantisto kaj vera amiko de nia lando Peter Poliščuk el Taŝkento. Nia foto lin prezentas aŭtune tiuĉi jare. Honoro al lia memoro.



BRNO

La 18.11.1981 subite forpasis multjara sindona kaj fidela s-ino Heda Borkovcová. Ni esprimas la plej profundan kondolencon al la familio. Daŭre ŝin rememoros la klubanoj. Honoro al ŝia memoro.

PRAHA

Fine de novebro forpasis ankaŭ nia membro Jaroslav Šercl, konata esperantisto longjara membro de EK Praha. Rememoru lin kun ni. Li mortis en aĝo 88 jaroj.

KORESPONDI
DEZIRAS
ANONCOJ

Per ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kčs aŭ 5 irpk.Abonantoj el eksterlando turniĝu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

28-jara instruistino kĉl pri ĉiuj temoj: 443058 KUIBIŜEV, ul.Pobeda, 83,kv.51 Sovetio, KUČUMOVA Galina Vasiljevna.

Korespondantojn por geinfanoj serĉas: Genadij M o t ĉ e v, selo Novyje Kodry, Berislavskij rajon. Ĥersonskaja obl. Sovetunio.

Komencanto serĉas konversacion. Vi trovos lin en la vendejo.Li ĝojas je via vizito: Josef V r o u č e k, Průmyslová prodejna Jednoty 54934 HRONOV 4 - VELKÝ DŘEVÍČ, ČSSR

31-jara lokomotivestro dez. kor.tutmonde pri sporto,muziko,turismo,interŝ.bildkartojn,diapozitivojn.Adreso:

Ant. D v o ř á k, Wolkerova 41, 783 35 HORKA n.Mor.ČSSR

Junpioniroj en aĝo de 10 - 11 jaroj,komencantoj kun diversaj interesoj dez.kor.kun la tuta mondo prefere per bildkartoj.Pionirgvidanto: Vladimír Dvořák, CS-751 03 B r o d e k u Přerova 56 ČSSR. Respondo garantiata!

6 junaj komencantoj-gekursanoj deziras korespondi prefere per bk ktm. Komuna adreso: Vladimír D v o ř á k,E-klubo ĉe PKO, Slovenská 5 772 00 OLOMOUC, ČSSR

31-jara Jaroslav TMEJ,okrsek O, č.2557 bl.309 CS-272 01 KLADNO,Ĉeĥoslovakio; interesoj:sporto,muziko,fotografado,filmado,kolor.diapozitivoj,gramodiskoj.

35-j.dez.koresp.kun TM pri historio,floroj kaj interŝanĝi BK kaj buŝtukojn: Irena HYKOVÁ, Ruská 14/425 101 00 Praha 10,Ĉeĥoslovakio.

Esperantajn librojn kaj malnovajn insignojn volonte aĉetos: Josef VAŠEK, St.Teichmanna 68, OLOMOUC,Ĉeĥoslovakio

31-jara KULAGINU G. Vladivostoka Esperanto-Klubo, av.100 let Vladivostoku 103 SU-690039 VLADIVOSTOK, Sovetunio, deziras korespondi tutmonde.

16-jarulo dez.kor.kaj interŝanĝi kolektaĵojn:GINTARAS Žiaunys, Hl.Žemaitijos 9-25 235500 - MAŽEIKIAI 1, Litovio,Sovetunio.

Sendu 100 uzitajn poŝtmarkojn de via lando kaj vi ricevos saman kvanton el mia lando: Jitka SKALICKÁ, Koněvova 227, 130 00-PRAHA 3 - Žižkov, Ĉeĥoslovakio.

Vincenta JUODIENĖ, oficistino, str. Architektu 96 - 2o, SU - 232 o49 Vilnius, Litovio USSR

Laima KAČINSKYTĖ, studentino , ŝatanta literaturon kaj filmojn, str. Giedraičiu 81 - 47 SU - 232 o42 Vilnius

23-jara Slávka Boudová kun tuta mondo, 382 73 Vyšší Brod nr. 275 - Ĉeĥoslovakio

Interesiĝantoj pri la abono al LITERATURA FOIRO,dumonata kultura revuo en Esperanto, petu informojn de S. Marček, Zvolenská 15, o36 ol Martin.

Hatajogano, nudisto, naturvaganto kaj fumomalŝatanto deziras kontaktiĝi kun saminteresantoj. Skribu al Utz FRIEDRICH Rodenbergstr.5 - GDR 1o71 Berlín

---

Loka grupo "Amikeco" en Česká Třebová invitas vin por ĉeesti la 12-an E - b a l o n, kiu startos la 30an de januaro '82 je la 20a horo en Uzina klubo ČSD. Ni atentigas geinteresulojn, ke dum la balo estas fumado malpermesota en ambaŭ salonoj. Lokbiletojn mendu jam komence de januaro '82 je adreso: Jiří P i š t o r a, nám. Míru 1746, 560 02 ČESKÁ TŘEBOVÁ, Ĉeĥoslovakio.

JPa


---

STARTO - nepravidelný věstník Ceského esperantského svazu, Jilská 10, 110 00 Praha 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně . Za obsah tohoto čísla odpovídá PhDr Jeromír Jermář CSc a Zdenko Křimský. Kresby Pavel Rak,grafická úprava Milan Labašta. Tisk zajišťuje Technické ústředí knihoven Praha. Předáno do tisku dne 26.11.1981. Dohledací pošta Praha 07, snížený poplatek za poštovné povolen ředitelstvím pošt Praha pod čj. P/1-1267 ze dne 6.4.1979.
STARTO - presorgano de ĈEA, Jilská 10, CS- 110 00 Praha 1. Aperas sesfoje jare, jarabono 24,-Kčs aŭ 10,50 gld.Jarabonojn akceptas niaj perantoj kaj UEA same kiel kotizojn por anoncoj.



# Krucenigmo

Horizontale: A. Konifera arbo; mallongigo de Internacia Sport-Presa Agentejo; per ekstrema parto de brako; lavpurigaĵa; ŝnur/o/ ĉe ŝipo. - B. La unua parto de eldiro de la angla verkisto William W. Collins /1824-89./ - C. Porka gras/o/; elektra aparat/o/; punktoj meze de cirkloj; manovri per ŝipvelo. - Ĉ. Kombin/o/ de notoj; angle "ĝis"; malnova areomezuro; brasfem/i/; baz/o/ de indigo. - D. Nomo de la 9a E-litero; multekosta; la dua parto de la eldiro; haventa aperturon; nomo de la 24a E-a litero. - E. Maligna tumoro; en maniero de malgranda grupo da politikaj batalantoj; komikaĵo; aĵ/o/ sekvanta post la dua. - F. Rilatantaj lirikajn poemojn; sovaĝa porko; demando pri objekto; persona pronomo; sentim/a/; akir/i/ serĉaĵon. - G. Kuniga metala peco; rostita pantranĉ/o/; helena virina nomo; sensperta; movi rondan objekton antaŭen. - Ĝ. La tria parto de la eldiro. - H. Ornamo de poemo; titol/o/ de kalifoj; nomo de la 13a E-a litero; romie 1502; ŝipriparejo.




Vertikale: 1. Marbord/o/ taŭga por banado; aŭdebla aervibrad/o/. - 2. Rizbrando; scienca termin/o/ por graso. - 3. Malŝata esprim/o/ pri oficistaro. - 4. Sufikso por naskito; fabela best/o/; abrupte flankenŝoviĝi. - 5. Nordeŭropa moner/o/; mallongigo por doktoro; la plej eta er/o/ de materio. - 6. Urbeto en Rumanio; elektra lampo. - 7. Angle "dividsignoj"; ripete fari ion ora. - 8. Hakita spicita viand/o/; rivero en Albanio. - 9. Ruse "aŭto"; nea konjunkcio; rilatanta trinkaĵon. - 10. Posesivo; uz/i/ en la praktiko; romie 950. - 11. Manier/o/ de belecesprimado; idoj de eŭropaj gepatroj en la intertropikaj kolonioj. - 12. Malutil/i/ /neologisme/; parto de lando. - 13. Interne; el juvelŝtono farita; mallongigo de 1000 m. - 14. Kvin hom/aj/ kapabl/oj/; fari; senvest/a/. - 15. Dokumentaro; restadi en akvo. - 16. En maniero de hejma malpura besto; eluzi /neologisme/. - 17. Romia amdi/o/; trapenetr/i/ ion rigarde. - 18. Turka guberniestr/o/; moviĝi piede antaŭen; komercaĵo. - 19.

Simbolo de radono; havanta econ de specio de antilopo; far/i/ trikoton. - 20. Kvalito de nematura ĝardena arbofrukto. - 21. Intence difekt/i/ maŝinon; dio de ventoj. - 22. Grenkonservujo; romie 106.

Helpo: A. Bras/o/. - C. Gibi. - Ĉ. Up to. - 9. Klos. - 2. Adip/o/. - 6. Ineu. - 7. Stops. - 8. Osum. - 18. Bej/o/ - 19. Gnua.

Adolf Staňura.

Sendu al nia redakcio la ĝustan tekston de la eldiro plej malfrue 14 tagojn post ricevo de tiu ĉi n-ro de Starto. 4 lotitaj solvintoj ricevos libropremiojn.


La moto de krucenigmo el STARTO n-ro 4 estis:

ESPERANTO ESTAS EDUKILO, KIU DAŬRAS LA TUTAN VIVON

Libropremiitoj pro la bona solvo de krucenigmo en STARTO 4/81:

1. Karel Štěpánek, Dolní Čermná 2.Karel Blažek, Mnichovo Hradiště, 3. V. Kocourek, Kralupy n.Vlt. 4.Ing. K. Votoček, Štětí 5. H. Hilliger, Prataŭ - DDR.

Al ceteraj kelkdekoj da solvintoj ni sincere dankas pro la entuziasmo kaj intereso.




OFERTO DE LA ESPERANTAĴOJ

En nia stoko nun estas sufiĉe granda stoko de la esperantaj materiáloj.Kelkaj el ili estas novajoj.

Vian mendilon sendu sur la PK al nia adreso. Eksterlandaj abonantoj al la perantoj- aŭ ankaŭ rekte al ni. Prezoj en Kčs.

| | | |
|---|---|---|
| Mark Twain | La aventuroj de Tom Sawyer | 14,-- |
| F.Karinthy | Vojaĝo al Faremido, Kapilaro | 42,-- |
| Dr.M. Béla | Oklingva nomaro de Eur.birdoj | 39,-- |
| Heltai Jenő | La morto kaj la kuracisto | 6,-- |
| Ivo Andric | Vizaĝoj | 12,50 |
| M.Resulovic | La legenda militestro | 19,-- |
| E.Kardelj | La historiaj radikoj | 10,-- |
| J.B.Tito | La nealianciteco | 15,-- |
| R.Dobrzynski | La nigra kokino Miki | 4,70 |
| Fremda eld. | Vjetnama socialisma respubliko | 10,00 |
| P.Kočič | MELO antaŭ tribunalo | 12,00 |
| T.Sekelj | Ridu per Esperanto | 15,00 |
| HOCHIMINH | Versaĵoj kaj prozo | 6,00 |
| J.Baghy | Metodiko - demandaro | 8,00 |
| Papírníková | Receptaro- supoj | 5,00 |
| Papírníková | Receptaro - fiŝoj | 5,00 |
| H.Seppik | La tuta Esperanto | 16,00 |
| H.Dresen | Estona poesio | 8,00 |
| Z.Nalkowska | Medalionoj | 12,00 |
| J.LIIV | Al abelulo ĝi flugas | 10,00 |
| V.Beekman | Lumo de orienta Europo | 5,50 |
| Kolektivo | SAEST 1980( katalogo de prelegoj) | 29,00 |
| R.Hromada | Panoramo - Intima triptiko | 16,00 |
| O.Kníchal | Panoramo - Mediteme | 16,00 |
| E.Urbanová | Panoramo - El subaj fontoj | 16,00 |
| Kolektivo | Junulara kantareto( du volumoj) | 11,00 |
| K.Čapek | Rakontoj el unua poŝo kaj rakontoj | 27,00 |
| Gutaro | Avoto( el Britujo) | 15,00 |
| Kolektivo | Meze de Eŭropo (pri historio de nia land) | 15,00 |
| J.Fučík | Riporto skribita en la pendumila maŝo | 25,00 |
| Papírníková | Sudbohemiaj burgoj kaj kasteloj | 8,50 |
| P. Bezruč | Sileziaj kantoj | 11,00 |
| J.Nesvadba | La perdita vizaĝo | 15,00 |
| H.Böll | La perdita honoro de iu Katarino Blum. | 37,00 |
| P. Kuusberg | Somermeze | 15,00 |
| V.Benczik | Baza literatura krestomatio | 39,00 |
| Kolektivo | Socipolitikaj aspektoj | 39,00 |

LASTMOMENTE NI EKSCIIS PRI LA FORPASO DE VALDEMAR VINAŘ, konata aktoro kaj reĝisoro, dum la 1.12.1981. Vi rememoru lin kaj bedaŭru kun ni lian forpason. La nekrologo ni publikos en Starto n-ro 1/82.

# Chemika

OBCHODNÝ PODNIK

BRATISLAVA

- AĈETO KAJ VENDO DE PRODUKTOJ DE KEMIA INDUSTRIO
- AĈETO KAJ VENDO DE TEKNIKAJ GAZOJ
- PROPRA PRODUKTO POR KONSUMANTOJ KAJ ERA PAKADO DE KEMIINDUSTRIAJ PRODUKTOJ
- VENDADO DE KEMIINDUSTRIAJ PRODUKTOJ PERE DE PODETALAJ VENDEJOJ

Chemika

OBCHODNÝ PODNIK

BRATISLAVA






# HALTU POR MOMENTO KAJ PENSU PRI VIA SANO

De tago al tago, de jaro al jaro vi senĉese ion kaptas, ĝis maksimumo streĉante la risorton de via sano. Kiel longe vi volas ankoraŭ toleri tion? Pripensu, ke vi havas nur unu sanon — kaj ebligu al ĝi por tre modera prezo tion, kion ĝi meritas: la kompleksan kuracadon en unu el la plej antikvaj kaj rekonataj banlokoj de Eŭropo.

**ĈEĤOSLOVAKAJ BANLOKOJ**
**— oazoj de sano, trankvilo kaj inspiro —**

KARLOVY VARY - FRANTIŠKOVY LÁZNĚ - MARIÁNSKÉ LÁZNĚ - JÁCHYMOV - TEPLICE V ČECHÁCH PODĚBRADY - JANSKÉ LÁZNĚ - TŘEBOŇ - JESENÍK LUHAČOVICE - TEPLICE NAD BEČVOU

**BALNEA** * Reprezentanto de ĉeĥoslovakaj banlokoj kaj kurac-fontoj.
PAŘÍŽSKÁ TŘÍDA 11, 110 01 PRAHA 1, ĈEĤOSLOVAKIO
Tx: 122 215